

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 104 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Februaro 1929

OUR ALPHABET JUSTIFIED.

(From the Esperanto of Dr. Privat
in "Esperanto," Dec., 1928)

The new law in Turkey changing the alphabet of the Turkish language will specially interest Esperantists. Here one sees that the Government of a great people has decided to force energetically the whole nation to abandon the old Arabic alphabet and to learn and use only the Latin letters.

Now, how are the different sounds of the Turkish language represented by the new alphabet? Are our Latin letters numerous enough to meet the phonetic principle of one letter for every sound?

The same problem that Dr. Zamenhof studied in his day has occupied for a whole year the close attention of an official commission of experts, which had to present its project for the approval of the President and Parliament of the Turkish Republic. It has solved it very much on the same lines as those laid down by Dr. Zamenhof. It rejected letter-combinations, such as SH or CH and preferred to make official the cedilla-letters S and C and the circumflexed letters ŝ and ĉ also ĝ for the special Turkish consonant GJ.

This should be brought to the notice of those facile critics of Esperanto who are too ready to affirm that the circumflex is out-of-date because Americans do not use it. Look! Hav-

ing radically changed its manners and customs in the last few years, this modern-minded, progressive republic of Turkey has given official approval to an alphabet very similar to that of Esperanto and so publicly confirmed the clear-sighted decision of Dr. Zamenhof.

In Europe, however, all modern printeries for a long time have had our circumflexed letters or even are using linotypes with free signs. It is a remarkable fact that all the new States in Europe use a phonetic orthography with circumflexes, while the western nations, who so firmly believe themselves modern and progressive, in point of fact use the most ridiculous and unphonetic orthography imaginable; this applies pointedly to the Americans, the British and the French.

It would be sheer madness for Esperanto to render its orthography old-fashioned and unphonetic in an effort to imitate, even in a minor degree, the English language. Esperanto does not live for this or that propaganda period. It lives and grows for the good of all mankind yet to be. To-morrow millions of children in schools throughout the world would be made to suffer unnecessarily, were we to spoil the relative perfection of its alphabet in order to avoid some insignificant expense to this or that dawdling printer.

—Trans. Robo.

GRAVAJ KONFESIOJ DE MOND-FAMA FILMDIREKTORO.

Los Angeles, Kalif. 25-a de Oktobro 1928.

La filmdirektoroj pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto. Subite ili eltrovas ke universala lingvo estas absolute necesa se ili volas vendi parolantajn filmojn en la eksterlando.

Unu el la plej unuaj homoj rekomendantaj Esperanton estas la mondfamo filmdirektoro Fred Niblo ĉe la fama kaj grandega filmfarejo Metro-Goldwyn-Mayer Studio. Li estas la viro kiu filmis Ben Hur.

Antaŭ nelonge Joseph R. Scherer, la delegito de UEA kaj Prezidanto de la Esperanto Klubo de Los Angeles, kune kun D-ro Chas. R. Witt, Vic-Prez. de la klubo kaj VD de UEA, havis la honoron esti invitataj viziti S-ron Fred Niblo kaj S-ron Joe Polonsky en iliaj oficejoj por diskuti la eblecojn kaj planojn pri la elekto de Esperanto por la parolantaj filmoj. Kelkaj el la direktoroj de tiu granda filmfarejo M-G-M estas favoraj al Esperanto, ĉar ili ekkonas la fakton ke Esperanto estas nepre necesa por universala sukceso de la parolanta filmo.

La famo filmdirektoro tre afable respondis je multaj demandoj. La respondoj jam estis presataj en multaj Usonaj gazetoj sed ĉi sube mi volas ripeti la plej gravajn eldirojn de la konata Fred Niblo. Jen la demandoj de S-ro Scherer kaj la respondoj de S-ro Niblo:

D. Kiam vi unue aŭdis pri Esperanto?

R. Antaŭ multaj jaroj mi legis pri Esperanto kaj aŭdis pri ĝi kiam mi laboris en Eŭropo.

D. Kial vi nun subite estas pli multe interesata en nia Universala lingvo?

R. Mi ne havis multan tempon por Esperanto. Mi ne bezonis la lingvon. Sed ĉar nun la parolantaj filmoj estas tiel multe ŝatataj en la tuta mondo, nova problemo ekaperis. Estas problemo de nia vivado, de nia sukceso en Eŭropo. La angla lingvo ne estas dezirata en la kontinenta Eŭropo. Universala lingvo estas nepre necesa por niaj novaj filmoj. Estas afero de mono. Se la filmoj ne estas uzeblaj en Eŭropo, niaj profitoj estas pli malgrandaj.

D. Ĉu vi ne kredas ke filmsteloj povus lerni diversajn naciajn lingvojn? (Li mem ne kredas tion, sed li deziris ke la filmdirektoro mem

diru ĝin.)

R. Tute ne! Tio estas absolute neebla. Ĝi estus ebla teorie sed ne praktike. Multaj bonegaj filmsteloj ne havas lingvan talenton. Plej ofte bonaj elparolistoj en unu lingvo ne povas lerni la akcenton de ĉe unu alia lingvo. Famaj eksterlandaj steloj devus lerni kun granda peno la anglan akcenton kaj eble ĉiam estus limigataj je eksterlandulaj roloj. Sed ĉe se estus praktike eble bone lerni tiom da lingvoj, ĉiam restus financa neeblaĵo, fari la saman filmon en diversaj lingvoj. Ne, tute ne, tio estos neniam ebla; la kosto estus terure alta, kaj neniam profito rezultiĝus.

D. Sed la Usonaj filmoj povus esti montrataj almenaŭ en Britlando, ĉu ne?

R. Jes, sed vi devas memori ke nia Usona-angla lingvo ne estas tre agrabla al granda parto de la Angla popolo. Ni havas krome, multajn idiomajn kiuj ne estas kompreneblaj de britoj. Tie ili havas aliajn idiomajn kiujn ni ne komprenas. Kaj la idiomajoj ja donas al la lingvo la spicon. La angla lingvo en britaj filmoj ne estos ŝatata de la plimulto de Usona popolo. Sed krom tio ĉio ni ja tute ne deziras perdi la klientaron de la kontinenta Eŭropo kaj aliaj landoj.

D. Ĉu Usonaj parolantaj filmoj ne povus esti montritaj kiel "silentaj filmoj" en la kontinenta Eŭropo?

R. Tute ne, ĉar la Eŭropanoj rifuzas esti tiel malĝentile malatentataj. La Eŭropaj filmfarejoj ja ankaŭ faros parolantajn filmojn kaj sen akcepto de ia neŭtrala lingvo la nun tiel ŝatataj Usonaj filmoj nepre fariĝus malŝatataj. Ankaŭ la estontaj grandaj filmoj de germanaj, francaj, italiaj kaj aliaj filmfarejoj estos limigataj je sia propra lando sen la simpla sed plej kompleta, plej logika kaj plej facila lingvo — la neŭtrala Esperanto.

Poste S-ro Scherer donacis al S-ro Niblo Esperantan flagon kaj insignon, kaj la fama direktoro ĝojis pro la donaco tiom ke li tuj ordonis fotografadon de la transdonado.

La adreso de la direktoro estas: Fred Niblo, ĉe Metro-Goldwyn-Mayer Studio, Los Angeles, Kalifornio. Ĉar subskribo-kolektoj nur malfacile organiziĝas estus tre helpa se arego da Esperantistoj sendus Esperantajn gratulojn al la fama direktoro.

La eldiroj de S-ro Niblo estas tiel

gravaj por nia movado ke ĉiu fervora Esperantisto certe deziros kopii la artikolon aŭ traduki ĝin en la lingvon de sia lando, por publikigado en gazetoj de sia urbo. — Jeroŝo.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.)

Antaŭaj tradukoj kaj notaroj en la kurso aperis en la numeroj de Junio ĝis Januaro de Suda KrucO. Studantoj dezirantaj kursaniĝi devus havigi al si tiujn numerojn, ĉar en estontaj notaroj ofte estos referencoj al klarigoj en ili. Por rievi estontajn tradukotajn pecojn ili sin turnu al Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, sendante al ŝi po 4 pecoj kaj unu adresita, afrankita koverto por ĉiu peco. Oni povas ricevi tradukotajn pecojn 1 ĝis 11 po 4 pecoj por ĉiu.

TRADUKO 9.

Unika Kolonieta En Sovagejo.
GEJO.

Estis nenio neordinara en la sonorilado (1) de la horloĝo nek en la tono de la sonorilo, tamen ĝin aŭdi estis por fremdulo miregiga okazo. Antaŭ momento ni estis traveturantaj ŝajne senfinajn mejlojn da sovaĝeja vojs-treko, dum emuoj kuradis antaŭ la aŭtomobilo kaj dense ĉirkaŭ ni staris eŭkaliptoj, ksantorheoj (2) kaj palmoj.

Jam aŭdigis kiel en civilizacio la argentecaj tonoj de sonorilado (1) en turo, kaj tie, apud senbrule fluanta rivero kaj ĉirkaŭita de verdaj kampoj, troviĝis vera peco el malnova Hispanujo, iel magie transportita en Okcidentan Aŭstralion.

Kiuj vidis ĝin, tiuj solaj povas tute kompreni la ĉarmon kaj mirigon (3) de la Benediktaj monaĥejoj kaj misiejoj ĉe New Norcia en distanco de okdek ĝis naŭdek mejloj norde de Perth. Ĝi estas unika kaj krom tio estas historia, ĉar jam en (4) la jaro mil-okcent-kvardek-sesa (5) fondis (6) ĝin patro (poste episkopo) (7) Salvado, ano de la Benedikta societo, kaj de tiam ĝi ĉiam kreskadis kaj progresadis. Ĝi estas belega.

Post nia longa aŭtomobila veturo de Perth tra la sovaĝeco mi sidis tie babilante (12) al lia moŝto la abato en la malvarmeta malalte plafonita gasteĉambro. Ekster la domo en la korto, ĉirkaŭita de (8) altaj blankaj muroj, hirundoj ronde flugadis (9) kaj glitadis malsupren el la nestoj sub la randoj de la tegmento. De-

nove la horloĝo sonoriladis, kaj tuj preterpasis nigre-robitaj kaj -zonitaj membroj de la societo. Por ni estis malfacile kredi, ke ni estas (10) en Aŭstralio, ne en la malnova mondo.

Tiu sento de nerealeco neniam mal-estigas en New Norcia. Ĝi estas forta en la granda biblioteko de la monaĥejo, fame konata (11) pro sia admirinda kolekto de Aŭstraliaĵoj. Tie estas civilizaciaj kvankam severaj komforto kaj kulturo kaj masivaj bretoj plenaj de literaturaĵoj de multaj landoj. Tra fenestroj oni povas vidi la riveron Moore (elp. mur), fluantan (11) preter la kampoj, kaj la densan arboran, kiu havas preskaŭ la saman aspekton, kiel ĝi havis tiam, kiam patro (7) Salvado brave piediris tra ĝi en la jaro mil-okcent-kvardek sesa por starigi misiejon por la indiĝenoj. La establo donas impreson de malharmonieco kun la natura ĉirkaŭaĵo.

Oni eniras la grandan blankan preĝejon de Hispana desegno, kies ĉizitaĵoj estas verko de Benedikta frato. (daŭrigota)

NOTARO 9.

Eraro: Ĉe la 15a linio antaŭ la fino de Trad. 8 legu "malproksime" anstataŭ "proksime."

1. Sonoriladi, chime (Mill.). — 2. La botanika nomo de "blackboy" estas "Xanthorrhoea." — 3. Komparu la nesamajn signifojn de "mir" kaj "surpriz" (Mill.). Ofte en la literaturo oni vidas "surpriz" neĝuste uzata anstataŭ "mir". — 4. "as far back as" Kp.: "Ĝi fondis la kudrejon jam antaŭ dedek jaroj" (Mart. 117/25). — 5. En tiu ĉi kurso bone estas skribi numeralojn per vortoj por ekzerci sin pri la ĝusta skribado kaj legado de ili. Ekz. 12. — 6. Ekzemplo de konstruo kun simpla verbotempo anstataŭ kunmetita. Notaro 1/21. — 7. "patro," "episkopo" (ne "Patro," "Episkopo"). Notaro 2/4. — 8. "ĉirkaŭitaj de" (aŭ "per"). La uzo de "de" estas ĝusta, ĉar la muroj mem ĉirkaŭis la korton. L.R. pĝ 73. — 9. En la tradukotan pecon oni enmetu "wheeled and" antaŭ "dipped" — 10. "estas" ne "estis." Notaro 2/15. — 11. Adjektiva participo. Notaro 1/20. — 12. Adverba participo. Notaro 2/10.

Ne sufiĉas

legi vian gazeton. Vi devas ankaŭ paroli pri ĝi al viaj amikoj kaj konatoj; ĝia sukceso estos via sukceso.

LERNEJA SISTE MO DE LA ĈEHOSLOVAKA RESPUBLIKO.

Ni ricevis de la konsulo en Sydney por la nomita lando ampleksan pritraktaĵon pri la supra temo. Jen elĉerpo:

“Nova ŝtato ĉs. naskiĝis antaŭ dek jaroj per unu renverso sensangverŝa, kiu finiĝis per proklamo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Fronten de tiu ĉi resp. oni starigis la prezidanton—filozofon, T. G. Masaryk, kiu estas ĉiam tre estimata.

“La sensangan renversion kaj la sukcesojn de la nova resp. oni povas kompreni el tio, ke la ĉeĥa nacio eminentiĝis jam tiam per sia rimarkinda edukiteco, ĉar ĝi havis inter loĝantoj de siaj ĉefaj teritorioj: Bohemujo, Moravio kaj Silezio, nur 4% de analfabetoj. En tiuj tri landoj okjara deviga irado elementan lernejon (de la 6a ĝis la 14a jaro de aĝo) estis enkondukita jam en 1869. Slovakujo kaj Subkarpata Rusujo, kiuj estis antaŭe parto de Hungarujo havis tamen kaj havas ĝis nun inter pli aĝaj loĝantoj grandan nombron de analfabetoj. Ĉe la popolsumigo en 1921 en Slovakujo estis konstatitaj 14.71 p.c. kaj en Subkarpata Rusujo 50.03 p.c. da personoj, kiuj ne scias eĉ legi ne skribi. Tiuj du teritorioj havis nur sesjaran iradon elementan lernejon, (de la 6a-12a jaro).

“Pro tio la ĉs. parlamento devigis zorgi pri unuigo de la lernejoj leĝoj kaj ĝi faris tiel en 1922 per leĝo, kiu enkondukis egalan okjaran devigan instruon en ĉiuj teritorioj de la resp. kaj malaltigis la antaŭan altan nombron de lernantoj en unu klaso de la elementa de 80 grade sur 75, 70, 65 kaj 60 lernantoj. Inter lernobjektoj la leĝo enkondukis nove la civitanan sciencan, kaj najbare de tiu ĉi objekto la knabajn manlaborojn. Ĝi ankaŭ permesis, ke la religia instruo ne estu deva por tiuj lernantoj, kies gepatroj skribe postulos, ke ili estu liberigitaj de tiu instruo. La leĝo decidis ankaŭ, ke instruistoj aŭ — inoj povas instrui en ĉiuj elementaj lernejoj kaj tiel, ke en ĉiu lernejo unu duono de postenoj estu okupata per instruistoj kaj la dua duono per — inoj. Postenoj de lernejestroj kaj la malparaj postenoj devas esti okupataj per viroj en knabaj lernejoj kaj en knabinaj per virinoj.

“Kamparaj elementaj lernejoj havas laŭ la nombro de lernantoj 1-8 sinsekvajn klasojn. Elementaj lernejoj en urboj havas kutime nur 5 klasojn, ĉar poste iliaj gelernantoj progresas

al pli altaj lernejoj: al urbanaj aŭ mezaj lernejoj.

La urbanaj lernejoj estas propre unu pli alta speco de elementa lernejo. En neniuj lando de antaŭa Aŭstrujo ili tiel disvastigis kiel en Bohemujo kaj Moravio. Tiuj ĉi lernejoj estas triklasaj kaj akceptas gelernantaron, kiu finis la 5-an klason de la elementa lernejo. Tie ĉi instruas fakaj instruistoj kutime po 3 objektoj. Oni dividas la lernantaron laŭseke en apartajn lernejojn. La evolucio de tiuj ĉi lernejoj pravas jeno:— En 1920 en la resp. estis 1412 urbanaj lernejoj kun 245,118 gelern.; en 1926/7 ĉiuj 1736 urbanaj lernejoj havis 310,010 gelern., el kiuj estis 144,409 knabinoj. Samtempe en 14, 158 elementaj lernejoj estis 1,403,823 gelern., inter kiuj estis 709,541 knabinoj.

“La ĉs. resp. tute praktikas la principon de Comenius, scie, ke ĉiu infano estu instruata en sia propra gepatra lingvo. Tial en tiu ĉi ŝtato la lernejoj estas dividitaj laŭ la gepatra lingvo de lernantoj.

“Laŭ la lasta statistiko en 1926 estis 9419 ĉs. elementaj lernejoj kun en knabaj mezlernejoj, kaj ili vere 922,901 gelern., 794 magiaraj kun 91,367 gelern., 87 polaj kun 10,407 gelern., 2 rumanaĵ kun 296 gelern., 9 judaj kun 613 gelern. kaj 76 aliaj aŭ kombinitaj (kun 2 aŭ 3 lingvoj de instruado) lernejoj kun 19,834 gelern.

“La nombro de de elementaj lernejoj (ankaŭ urbanaj kaj aliaj) respondas al proporcia nombro de loĝ. de ĉiu nacio. El 13,604, 807 loĝ. estis per la popolsumigo en 1921 konstatite, ke en la resp. restadas 65,53 p.c. ĉeĥoslovakoj, 3.44 p.c. rusoj kaj ukrainoj, 23.36 p.c. germanoj, 5.58 p.c. magiaroj, 1.35 p.c. judoj, 0.57 p.c. poloj kaj 0.17 p.c. de aliaj nacioj.

“La minoritan elementan lernejon oni kutime organizas, se 40 inf. de la dua lingvo sin prezentas, kaj la minorita urbana lernejo devas esti organizita, se la lerneja komunumo havas almenaŭ 400 gelern. de tiu minorita lingvo. Nun estas jam 983 minoritaj elementaj kaj 157 urbanaj lernejoj.

“Por spiritmankaj kaj alie difektaj infanoj nun staras entute 74 lernejoj kun 4351 inf. Krom tio en urboj estas organizitaj 162 helpantaj klasoj. 1584 infanvartejoj havas en urboj 99,134 inf. de 3-6 jaraĝajn. Privataj lernejoj (monaĥejoj kaj aliaj) estas malmultaj en Ĉs.

“Por knabinoj oni organizas en grandaj urboj apartajn mezajn lerne-

jojn, sed knabinoj povas ankaŭ studi kreas unu kvaronon de ĉiuj lernantoj en tiuj lernejoj. En 1927-8 7671 knabinoj vizitadis 30 knabinajn mezlernejojn kaj 15,222 lernantinoj vizitadis knabajn mezlernejojn. Entute Ĉ. havas 297 mezlernejojn en kiuj sidas 109,912 gelern.

(Tiam sekvas priskribo pri la eduka sistemo rilatanta al la instruistoj, kaj al la fakaj, komercaj, kaj industriaj flankoj de eduko. Ankaŭ pri la agronomia, arbarista, domsciencia kaj popolokultura - legemiga eduk - statistiko oni lernas per ĉi tiu interesa por multaj raporto, kiu ja montras sur unu plej ĝenerale-kulturitaj popoloj en Eŭropo.)

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.W. — Ankoraŭ venas al ni alilandaj Esperantistoj mondvojaĝantaj. La plej nova alveninto estis Doktoro de Vilnits, el Latvujo. Tiu ĉi sinjoro, kiu estas doktoro de medicino, kaj paroladas deklinu lingvojn, vojaĝas ĉirkaŭ la mondo per motorbiciklo, por vidi la mondon kaj ankaŭ por akiri sperton en la medicino en diversaj landoj.

Li jam dufoje parolis al la Sydney E. Societo pri siaj vojaĝspertoj, unufojon kun lumbildoj. Ĝis nun li vizitis kvindek landojn . . . preskaŭ ĉiu lando en Eŭropo kaj la plej multaj en Azio kaj Afriko. Kaj en ĉiu el tiu ĉi landoj, krom en naŭ (Belga ŝtato en Afriko, Mesopotamio, kaj similaj negravaj lokoj) li trovis Esperantistojn.

Li sendube havis interesan kaj okazoplenan vojaĝadon, kaj ĉe iom da tragedio ankaŭ, ĉar, dum li estis en Ĥinuĵo, dum la estintaj malpacoj, lia amiko estis mortpafita je lia flanko. Post multaj aventuroj en Ĥinuĵo, li veturis tra Malajo kaj ĉirkaŭaj insuloj ĝis nordokcidenta Aŭstralio, kaj ĉirkaŭ Aŭstralio ĝis Sydney. De tie ĉi li veturos al Nova Zelando.

Je la vespero de 17 Januaro, sinjoro J. Domingo interesigis la klubanoj per Esperanto deklamoj.

LA ĈEVALINO DE HADITA.

Hadita Paŝao, ŝejko el El Khour, heredis tre multe da kameloj, kaproj kaj ĉevaloj, sed lia malavara kaj kompata naturo baldaŭ lin malriĉigis. Kiam lia najbaro Sirhan foriris suden por negoci pri mielaj daktiloj kaj suferis dum la vojaĝo rabatakono de Ŭahiboj, per kiu li perdis ĉion, Hadita dividis en duonojn sian tutan posedadon kaj donis al li.

Sed restis unu objekto, kium Hadita tute ne volis fordoni; nome sian preferatan blankan ĉevalinon. Unu ŝejko nomata Goren aĉete proponis 300 funtojn ore por ĝi, tamen Hadita diris, ke li ne volas vendi ĝin kontraŭ kiom ajn prezo.

Tiam diris Goren:—Mi havas flinon, kiu estas tiel bela, ke jam multaj ĉefoj petis ĝin kiel edzinon. Mi proponas ĝin al vi interŝanĝe por via ĉevalino—

Ankoraŭ Hadita malakceptis. Goren diris:—Mi tamen juste - nejuste volas posedi la ĉevalinon. Tial, ke vi volas nek vendi nek interŝanĝi, mi vin avertas, O Hadita, ke mi intencas ĝin ŝteli—

Hadita rediris:—Nu, vi avertis—

La legantoj sciu, ke laŭ Araba honormoro ne estas hontinde, ke oni priŝtelas amikon avertinte lin pri intenco tion fari.

Foren rajdinte Goren ne sin vidiĝis al Hadita dum jaro kaj lasis neski al si longan taŭzan barbon. Post iom da tempo Goren sciiginte, ke Hadita tuj iros al Damasko por negoci pri aĉeto de iuj kameloj, survoje iris antaŭ ol li. Tinkturinte la vizagon per koto kaj heneo, li sin vestis per ĉifonoj, donis al si doloran vundon en la piedo per ponardo kaj ekiris laŭ la vojo, kiun Hadita devos laŭvojaĝi. Se Goren nur sin ŝajnis ekti laca kaj dolorigata, la akraj okuloj de Hadita nepre rimarkus la malveraĵon; tial Goren efektive sin faris lecega kaj tre suferanta per longa lamirado trans mejlojn sub la ardanta suno.

Fine Hadita envidiĝis al li, galope-

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p

ia adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

tante sur sia blanka ĉevalino, kun lia pafilo surŝultre. Goren falis sur la vojon. Hadita tirbride haltigis la rajdaton, kaj sin klinis super la vundiginta almozulo. Goren penspire diris, ke li volas iri Damaskon, sed ne povas plu.

Laŭ sia bona naturo Hadita levis la fremdulon en la selon kaj marŝis ĉe la piedingo. Goren silentis duonhoron por rekolekti siajn fortojn kaj tiam proponis, ke la nobla ŝejko pendigu sur la selbutonego la pezan pafilon, por ke estu al li malpli ŝarĝe. Tuj kiam Hadita tion faris Goren ekgalopigis la ĉevalinon, ĝin turnante por ĵeti krion:—Mi juste vin avertis, O Hadita—

Li jam ekforgalopis, sed Hadita laŭvoĉe haltigis lin. Ankoraŭ unu fojon Goren turnis sian rajdaton, kaj Hadita kriis:—En justa maniero vi jam gajnis la ĉevalinon, Goren, kaj mi ĵuras, ke ĝin mi ne penos rehavi, se vi ĵuros neniam malkaŝi antaŭ aliu, kiel vi gajnis ĝin—

—Mi ĵure promesas. Sed kial? — demandis Goren.

—Se ĉi tiu faro disvastiĝus en la dezerto—Hadita respondis—neniu vojaĝanto plu kuraĝus doni helpon al vundito aŭ almozulo—

Tion aŭdinte, Goren elseliĝis, kaj etendante antaŭ si la pafilon kaj bridrimenon, li diris:—Mi ne povas tian homon priŝteli—

Ili kune iris al Damasko. Goren ankoraŭ rajdis, ĉar insistis pri tio Hadita, kiu poste mem tenis la ĉevalinon, dum Goren tenis la amikecon de Hadita, kiu amikeco estis ja multe pli valora.

(W. B. Seabrook, en "Adventures in Arabia." Trad. Robo.)

CHANGE OF ADDRESS.

The Melbourne Esperanto Society have moved to Room No. 3, Temperance Hall, Russell Street, and will in future meet every Tuesday night at 8 o'clock. The Society hopes to make this a permanent address.

"SOVETIO."

Laŭ avizo de Rusa s-ano la plimulto da lialandanoj uzas la formojn "Sovetio" kaj "Sovet-Unio." Sed Zamenhof skribis "sovjet" ĉe La Gimnazio" (60/5, 13), kiu cetere ne troviĝas en la "Radikaro" de Wuster. Multe da E-tistoj tamen ankoraŭ uzas la antaŭrevoluciajn "Rusujo" aŭ "Rusio." — (Robo.)

CEFANJA.

Two Esperanto Versions.

Two things are necessary to a good translation, says Washington Moon. The one that it should be a faithful expression of the ideas intended to be conveyed in the original; and the other that it should be a grammatical expression of those ideas, according to the idiom of the language into which the translation is to be made. It follows then that a literal "photographing," or word for word rendering, of the original texts, is often impossible when translating into national languages, although at times one gives, for purposes of literary analysis, a "bold," or literal, translation, that is, an unidiomatic composition following, as far as is intelligibly possible, the word-order and general style of the original. Esperanto, possessing not only a free word-order but also wonderful flexibility of word-combination, is therefore a more efficient instrument of translation than national languages, hampered by their own "genius" or spirit, can possibly be. Esperanto can reproduce to a certain high degree the personal style and national characteristics of a writer and follow not only his perhaps intricate sentence construction but also faithfully "Esperantize" his most ungainly compounds in a way of course forbidden to the more analytic English and the Romanic tongues.

For instance, accurate translation of Hebrew into a national language is impossible owing, for one thing, to the grammatical Seven Voices characteristic of the ancient tongue. In Esperanto it is possible, although in a literary translation perhaps not expedient. But at least one Hebraist has expressed regret that in the biblical translations these voices have been ignored, seemingly because of a fear on the part of the translator that precise rendering of them would mar the literary beauty of the passages in which they occur.

Here are examples, based on two versions of Zephaniah. The first is by Dr. Zamenhof, who translated the book primarily as a piece of fine prose composition; numbers of Hebrew idioms, many or most of which, standing alone, would be unintelligible to Western readers, were recast by the Master, and the result has been a text that reads very smoothly when

compared with that of the unknown Hebraist who in 1910 published his "La Biblia Profeto Cefanjaho antaŭanoncinta Esperanton." In this latter one has a literal rendering of the book, an attempt to give the world the content of the prophet's utterance in its original purity, or shall we say, crudity of expression as it appears when transferred literally into the dress of modern language. So the translator informs us that the book of Zephaniah clothed in its natural Hebrew is much more beautiful than in his elaboration of it in Esp-o.

The student should compare the following variants. The Zamenhof citation stands first.

1/3. Mi forprenos la homojn.

Mi ĉesigos la tersupraĵojn. (Heb. Adam).

v.4. Bia ekstermos de ĉi tiu loko la restaj de Baal.

Mi detranĉos el tiu ĉi loĝo la kunskrapaĵoj de B.

v.6. Tiujn, kiuj defalis de la Eternulo.

La malantaŭen turniĝintojn el sekve de la Eternulo.

v.17. Mi premos la homojn.

Mi en-mallargej-igos la tersupraĵojn.

2/5. Mi vin pereigos tiel, ke restos neniu loĝanto.

Mi eĉ perdiĝ-igos cin ĝis ne estos loĝanto.

3/3. Ĝiaj juĝistoj estas kiel lupoj vespere; ili nenion restigas ĝis mateno.

Siaj juĝistoj estas vesperaj lupoj; ili ne ĝismordadas la tagiĝon.

v.4. Ĝiaj pastroj malsanktigas la sanktejojn, kripligas la instruojn.

Siaj ofristoj elpikis la sanktejojn. ili perfortis la celigaĵojn. (Note the difficulty of a literal rendering here.)

v.5. La Eternulo estas ĵustulo mezo de ĝi, Li ne faras maljustaĵojn; ĉi-matene Li montras Siajn leĝojn, ne ĉesas; sed la malpiulo ne konas hon-ton.

faros maljustfaron; tagiĝe post tagiĝe sian porfaraĵojn Li donas al la lumo; Le ne estas mankata; sed ne konas la malĵustulo la paliĝon.

v.9. Tiam Mi redonos al la popoloj lingvon puran, por ke ĉiuj vokadu la nomon de la Eternulo kaj servadu al Li unu-voĉe.

Car tiam Mi alturnos al la popoloj lingvon purigitan, por ke voku ĉiuj per la nomo, Jehovon, por servi Lin unu-voĉe.

v.17. Li ĝojos pri vi gaje, Li pardonos al vi pro Sia amo, Li ĝoje triumfos pri vi.

Li ĝu-sentos je ci kun gajeco; Li silentos en sia amo; Li ĉirkaŭ-saltados je ci kun sonor-kriado.

(Robo.)

ESPERANTO CONGRESS.

Meeting in Perth Proposed.

At a meeting on Saturday afternoon of those interested in Esperanto it was decided unanimously to arrange a West Australian Esperanto Congress for this year. The congress has been fixed for October and Esperanto associations throughout the world will be notified of the event.

Mr. T. Burt, who presided at Saturday's meeting, said the congress, in addition to stimulating interest in Esperanto, should also further trade, as many foreigners would attend. They would have an opportunity of obtaining first-hand information on the State's economic condition and resources. Local business men would also realise the value of Esperanto as a commercial language.

A committee was formed to deal with the proposed congress and the following officers were elected:—President, Mr. T. Burt; vice-presidents, Messrs. C. Unwin and M. T. Stitz; secretary and treasurer, Mr. L. C. Mansfield. It was stated that already £70 had been guaranteed to meet any expenses entailed. It was resolved to inform the State Centenary Committee of the meeting's decision.

The Universal Esperanto Association has promised to circularise 8,000 delegates concerning the intended congress.

—"West Australian," 14th Jan., '29.

NIA NOV-ZELANDA KRONIKO.

Ĉar la diversaj kluboj kaj klasoj en Nov-zelando interrompis sian agadon dum la festotempo kaj kredeble ne refunkciados ĝis Februaro, raporto pri tiuj nuntempe mankas. Tamen, ni esperas havi por nia venonta numero, aldone al la ordinara kroniko, ampleksajn detalojn pri la nacia konferenco, kio okazis en Wellingtono je la 26a de la pasinta monato — tro malfrue por enpresii en tiu ĉi aldono — kiam delegitoj diskutis proponon restarigi la nun dormantan N.Z.-an Asocion Esperantistan.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nono kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata). E. J. O'Reilly, 9/-, Junio '29; W. Waterman, 4/6, Junio '30; W. McPherson, 10/-, Sept. '29; H. Franks, 5/-, Dec. '29; C. Whittenbach, 4/6, Dec. '29; W. J. Parker, 4/6, Nov. '29; C. W. Ballard, 5/-, Dec. '30; S. Clark, donaco 3/-, 4/6, Jan. '30.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperantisto, 11, 12; Arbeiter-Esperantisten, 5-9; Amerika Esperantisto, 5; Arbeiter-Esperantist, 11; British Esperantist, 285; Bulgara Esperantisto, 2-3, 4; Belga Esperantisto, 7; Bulteno de Esperanta Pres-Agentejo, 19, 20; Esperanto et Commerce, 4, 5; Germana Esperantisto, 12; Heroldo de Esperanto, 43, 46 ĝis 49; International Language, Dec.; Internacia Medicina Revuo, 6; La Tagigo, 6, 7; La Revuo Orienta, 12; La Socialisto, 11, 12; Oomoto Internacia, 24; Svenska-Tidningen, La Espero, 10; Verda Stelo, 11.

EDUCATION AND ESPERANTO.

CHINA. — Since December, 1927, Esperanto has been taught as a compulsory subject in the Municipal School for Women in Shanghai. An optional evening course has been commenced at the Anglo-Chinese College in the same town. The Workers' University of Kianwow, near Shanghai, introduced the compulsory teaching of Esperanto more than a year ago. The high school of Putun has done the same.

—I.E.S.

HENRY E. CALWELL (Reg.)

Kuracadas malsanulojn kun bonegaj rezultatoj per Osteopathy, Chiropractic, Dieto kaj aliaj sendrogaj metodoj.

Donas informon senpage.

11 COLLINS ST., MELBOURNE.

Tel.: Cent. 4018.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto - Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 3-a etaĝo, King House, Queen-str. Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose MacPherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Queensland).

WELLINGTON ESPE R A N T O CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin . . (Cox) . . Paper . . . 6d.
Aŭstralio, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio . . . 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Ililio . . (Sinnotte) . Cloth . . . 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.